



De la Prezidanto de MEL

Saluton muzikamantoj! Mi esperas ke 2007 bone progresas en via vivo.

Dum UK 2006 en Florenco mi konsentis fariĝi Prezidanto de MEL por certigi ke MEL daŭras, speciale en la memoro de Dimitar Terziev, kiu gvidis MEL-n dum multaj jaroj.



MEL naskiĝis je la 16-a de marto de 1963, kaj estas Fak-Asocio de muzikistoj, muzikantoj kaj muzikamantoj el la tuta mondo. Ĝi estas kunlaboranta kun UEA, kaj servas al siaj membroj kaj al la Esperanto-movado.

Rimarku ke MEL apartenas ne nur al la Internacia Esperanto Ĥoro, sed intencas subteni muzikon ie ajn en Esperantujo. Ni celas ĝui muzikon per Esperanto, kaj ankaŭ ĝui Esperanton per muziko!

Por ĉiuj, kiuj ne konas min, mi estas Emerita Profesoro pri Edukado de Monash Universitato, Melburno, Aŭstralio. Mi esperantiĝis en 1993

kaj dum UK en Adelajdo, Aŭstralio, mi gvidis la Artajn Aranĝojn. Post la morto de Dimitar Terziev, kaj kun mia edzino, kiu estas membro de IEĤ ekde 1986, ni decidis revivigi MEL-n. Pasintan jaron ni aranĝis Jarkunvenon de MEL dum UK en Florenco (vidu la raporton ie en ĉi-tiu MUZIKO) kaj s-ro Rössler estis Dirigento de IEĤ, ĉar mi gvidis la Artajn Aranĝojn. Ĉi-jare en Jokohamo mi refoje gvidos IEĤ, kaj vi vidis en MUZIKO Numero 2-a, la unuajn elektojn de la muziko por IEĤ unu estas bela japana kanto. Nepre lernu vian voĉparton antaŭ UK 2007!

Fine, mi ĝojas ke Jesuo konsentas redakti MUZIKON, kaj mi antaŭvidas legi pri viaj aktivaĵoj en Esperantmuzikujo! Skribu al li rapide mi petas!

Honora Prezidanto: David Gaines, Usono.

Prezidanto: Alan Bishop, Aŭstralio.

Sekretario: Jennifer Bishop, Aŭstralio.

Voĉdonanto: Ian Fantom.

Redaktoro: Jesuo de las Heras, Hispanio.

El Honora Prezidanto

Kara samideanoj kaj muzikamantoj,

Salutojn kaj bondezirojn por 2007 el Usono! Unue, mi tre feliĉe akceptis la honoron de la MEL-posteno de honora prezidanto, nome de mia malnova kaj elkore memorita amiko, Dimitar Terziev. Mi tranoktis ĉe la Terzievoj en Sofia en 1994 kaj neniam forgesos la fortan muzikemon de S-ro Terziev kaj, ĝenerale, lian feliĉecon kaj amikemon, kaj kompreneble lian fieron pri la mirinda muziko de sia lando, Bulgario, al kio li enkondukis min profunde.

S-ro T sendube samopinius ke, rimarkante la malfeliĉan situacion de la hodiaŭa mondo, certe estas eĉ pli grava por ni disvastigi pacon per muzikon. Viajn klopodojn tiurilate mi aplaŭdas.

Nuntempe mi verkas plentempe kiel komponisto kaj verkas novan muzikaĵon; specife, novan koncerton por bariton-saxofono kaj orkestreto. Oni surbendigos ĝin en Slovakio en Novembro aŭ Decembro por nova kompaktdisko de nuntempa klasika muziko por grupetoj, eldonota en 2008 ĉi-tie en Usono. Haveblas ĉe la kutimaj butikoj, vendejoj, kaj TTT-paĝoj.

Jam ondego de muzika elŝutado atendas vin! Pri tio el mia muziko, kio rilatas al Esperanto, se vi ankoraux ne aŭdis la ĥorusan kanton «Povas Plori Mi Ne Plu,» kio temas pri la iama milito en Bosnio kaj Hercegovino, oni povas elŝuti ĝin senpage ĉe: http://mp3.washingtonpost.com/bands/david_gaines_composer.shtml kaj la tekston ĉe: www.davidgaines.org/povas.rtf (la tekston mi preparis kiel Rich Text Format (RTF)-dosiero, kion cxiuj vortprocesiloj povas legi). Finfine, mia Esperanto-simfonio jam haveblas elŝuteble ĉe: [\[www.emusic.com/album/11005/11005835.html\]\(http://www.emusic.com/album/11005/11005835.html\). Turnu vin al mia propra TTT-ejo, \[www.davidgaines.org\]\(http://www.davidgaines.org\), por ligo al la UEA-vendejo, kie oni povas acxeti la kompaktdiskon mem perpoŝte kaj legi recenzon en Esperanto el la paĝoj de Esperanto-revuo. Do kio pri vi? Ĉu vi muzikas? Mi adiaŭas al vi kun la vortoj de la fama usona komponisto Vincent Persichetti, kiu iame diris «Vi estis komponisto hodiaŭ se vi komponis muzikon hodiaŭ.» Do ek al la verkado por mi kaj agrablan muzikplanan printempon al vi ĉiuj! Muzike,*](http://</i></p>
</div>
<div data-bbox=)*

David Gaines,

www.davidgaines.org

NOTO.- La popolkantano muzikaron «Ni Kantu En Esperanto» sur ESP-Disk Records, de 1969, haveblas denove ĉe iTunes. Por elŝuti ĝin, serĉu je la nomo «Duncan Charters» aŭ je) Ni Kantu En Esperanto» uzante la serĉilo ene de iTunes.

De la sekretario de MEL

Mi konsentis fariĝi Sekretario de MEL ĉe 91aUK en Florenco por subteni la gravan fakasocion kaj por helpi mian edzon, kiu bonkore akceptis la rigoran taskon de prezidanto de MEL. Kantantino aldo-voĉa en IEĤ dum preskaŭ 20 jaroj kun la dediĉita kaj ĉarma prof. Dimitar Terziev el Bulgarujo, mi esperas ke multaj aliaj malnovaj kaj novaj kantomuloj ĉeestos dum 92aUK en Jokohamo. Por membriĝi al MEL kaj por ricevi nian gazeton MUZIKO, almenaŭ du numerojn jare, la kotizo nun estas EUR5 pagota en Julio 2007 al UEA-konto mel-x-y aŭ al mi mem ĉe 92aUK.

Refoje mi dankas al la nuna membraro kiu pagis dum 91aUK en Florenco kaj ebligis ĉi-jaran mendon de ĉambroj en Jokohamo kaj la eldonon de MUZIKO.

S-ino Jennifer Bishop (Ĵeni)
39 Hill St,
Hawthorn,
Victoria 3122,
Aŭstralio

Raporto pri la Kunveno de Florenco

Kara membro de la Muzika Esperanto Ligo (MEL)!

Unue permesu min danki kaj gratuli vin pro via membriĝo al MEL. La jaro 2007 komencis, kaj mi deziras al vi Bonan Novjaron. Nun estas taŭga momento por skribi al vi pri MEL kaj pri la Jarkunveno de MEL kiu okazis dum la UK 2006 en Florenco.

Kelkajn aferojn diskutis pli ol 30 membroj. Jen la ĉefaj aferoj:

1. La nova komitato estis elektita – **Alan Bishop** (Prezidanto), **Jesuo de las Heras** (Vic-Prezidanto kaj Redaktoro de *Muziko*), **Jennifer Bishop** (Membro-Sekretario kaj Kasisto) kaj **Ian Fantom**.
2. **David Gaines** estis elektita kiel Honora Prezidanto, kun granda aplaudo.
3. Ni decidis ke la aliĝkosto por membriĝi al MEL estas 5 eŭroj jare. Se vi ricevas ĉi tiun leteron, vi estas membro ĝis la UK 2007.
4. Pri la rilatoj inter Internacia Esperanto Ĥoro (IEĤ) kaj MEL, ni decidis ke estus taŭge se ĉiuj kantantoj en la IEĤ devas membriĝi al MEL, kaj kompreneble devas pagi la aliĝkoston. Tamen almenaŭ du problemoj restas: 1. Ĉu ni rajtas insisti al ĉiuj kantantoj pri la pago de la aliĝkosto? 2. Estas kelkaj personoj kiuj partoprenas la IEĤn nur unu aŭ du tagojn. Laŭ mi, ni ne povas insisti pri la pago, sed devas kuraĝigi la membrojn de IEĤ subteni MEL finance, ĉar MEL faciligas kaj

subtenas IEĤ, ekzemple pri la kosto de la muziko.

5. Pri la **estonta rolo de MEL**, estis multaj sugestoj, ĉefe pri la daŭrigo de la organo MUZIKO, kiu funkcias kiel la apogilo de la asocioj. Dimitar Terziev, la fondinto kaj koro de MEL skribis en MUZIKO 97/1-2 “MEL estas Fak-Asocio de muzikistoj, muzikantoj kaj muzikamantoj el la tuta mondo, kaj MEL servas al siaj membroj kaj al la Esperanto movado. En *Muziko* oni traktas ĉiusepacajn temojn; oni prezentas informojn, kantojn, kaj leterojn de MEL-membroj pri ilia agado”. Bonŝance por ni, Jesuo de las Heras redaktis novan stilon de *Muziko* rete en Septembro de 2005 kaj ni dankis lin pro lia laboro. Ankoraŭ ni esperis ke li daŭrigos la organon de MEL en tiu stilo – sed por ĝi li devas ricevi informojn, novaĵojn, leterojn, fotojn ktp. Lia retadreso estas jheras1@yahoo.es
6. Pri aliaj aferoj, se vi deziras ricevi *Muzikon* aŭ alian informon rete, bonvolu sendi vian retadreson kaj al Jesuo de las Heras kaj al Jennifer Bishop ĉe Esperanto@Education.monash.edu.au.
7. Ni deziras publikigi la nomojn kaj adresojn (ankaŭ retadresojn) de membroj en *Muziko*. Se vi ne deziras montri viajn informojn ‘publike’ bonvolu informi Jennifer kaj Jesuon.

Finfine, mi sendas al vi miajn bondezirojn por sana, ĝoja kaj belmuzika novjaro, kaj mi esperas ke mi vidos vin en la UK, Jokohama, 2007. Mi estos la Direktoro de la IEĤ tie, kaj mi sendos pli da informoj pri ĝi en la nova jaro.

Amike kaj muzike,

Alan Bishop,
prezidanto

8.

LA ESPERO
Dro L.L. Zamenhof

Movo de milita marŝo

F. De Menil
Unisone:

f

En la Sub'la Surneul'

D7 G D G Am G/H D7 G

mon-don re-nis no-va sen - to; tra la mon-do i-tas forta
 sankta signo dal'Es-pe - ro, ko-lek-ti-gos pacaj bata-
 ra-la lingvo funda-men - to, kompre-nan-te unu la a-

G Gmaj7 G6 G D7/G G G/D Em7 Hm Em6/ciss

vo - ka; par-flu-gi-loj de fa-ci-la ven - to nun de
 lan - toj, kaj ra-pi-de kreas la a - te - ro per la-
 li - an la po-po-loj taras en kon-sen - to u - nu

f

D7 G Em Hm Hm/D

la - ko flugu ĝi al - lo - ko. Ne al gla - vo sangon so - i
 bo - ro de la Espe - ran - toj. forte sta - ras muroj de mil -
 grandan rondon ĉami - li - an. Ni - a di - li - genta kale -

G7 Hm Em7 F#sus F#7 Hm Am6 Am7/G D7

Animato

ho-mojn sur-te-re. ce-le-bru gin ni kun ad-mit',
 ho-mojn sur-te-re. ce-le-bru gin ni kun ad-mit',
 ho-mojn sur-te-re. ce-le-bru gin ni kun ad-mit',
 ce-le-bru gin ni kun ad-mit',

ce-le-bru gin ni kun ad-mit', ce-le-bru gin!
 ce-le-bru gin ni kun ad-mit', ce-le-bru gin!
 ce-le-bru-gin ni kun ad-mit', ce-le-bru gin!
 ce-le-bru gin ni kun ad-mit', ce-le-bru gin!

Sed ŝvelos nia esper'

(Kyô no hi wa sayônara)

versoj k muziko de **Kaneko syôiti**
 arango de **Kasai yasurô***
 traduko de **Konisi gaku**

mp

Daŭ - ru a - mi - kec' in - ter vi kaj mi sen ĉes' lu lu
 Lu lu lu lu lu
mp
 eĉ se ve - nos

6

lu lu lu lu lu lu lu lu
 lu lu lu Lu Nun di - si - ĝas ni, ĝis re -
 kru - da su - fer'. Lu lu lu lu

11

Lu lu lu lu lu lu Lu lu lu lu lu
 Lu lu lu lu lu lu lu Lu
 vi - do, a - mik', sed ŝve - los ni - a es - per'.
 Lu lu lu lu lu lu lu lu lu

17

mp
 flu - gas en ĉi -
mf
 Ki - el blan - ka gru' flu - gas en ĉi - e - la blu', vi - vos ni en

Sed ŝvelos nia esper' 2

22 Nun di-si-ĝas ni, ĝis re-vi-do, a -
 e - la blu', La la la la
 Nun di-si-ĝas ni, ĝis re-vi - do, a -
 ple - na li - ber'. la

28 mik', sed ŝve - los ni - a es - per'.
 mik', sed ŝve - los ni - a es - per'. *m* Kres - ku ĉi-am

34 pli la kon - fi - do in - ter ni ki - el po - lu - ri - ta ju - vel'.

40 La la la Nun di-si-ĝas ni, ĝis re - vi - do, a - mik', sed ŝve - los

46 ni - a es - per'. *p rit.* sed ŝve - los ni - a es - per'.
p rit.

3. KANTO de L' LIGO

Vortoj de Zamenhof

W.A Mozart.

Venu kanti en Japanio!

Venu kanti en Japanio!

Soprano (S) and Alto (A) parts. *mf*

① Fra - toj, ma - non do - nu ko - te kaj sen,

Tenore (T) and Bass (B) parts. *mf p*

Soprano (S) and Alto (A) parts. *f*

zor - ge sen do - lo - te be - lan ho - ron

Tenore (T) and Bass (B) parts. *f*

Soprano (S) and Alto (A) parts. *p*

fes - tu ni! Ĉi - on te - ran for - je -

Tenore (T) and Bass (B) parts. *p*

Soprano (S) and Alto (A) parts. *p*

ton - te dai - ru for - te kaj kon - stan - te

Tenore (T) and Bass (B) parts. *p*

Soprano (S) and Alto (A) parts. *mf*

ni - a be - la hat - mo - ni', ni - a

Tenore (T) and Bass (B) parts. *mf*

Soprano (S) and Alto (A) parts. *f*

be - la hat - mo - ni'.

Tenore (T) and Bass (B) parts. *f*